

LA NUNA ESTU LA JARDEKO DE ESPERANTO.

Dum la jardeko, kiu nun malfermiĝas antaŭ ni, la Internacia Lingvo Esperanto fariĝos centjara. Tra la jaroj depost 1887 la lingvo malfermis la horizontojn al simplaj civitanoj, ĝi dissemis sentojn de komprenemo en malpaca mondo; ĝi kreis kulturajn pontojn inter la nacioj, ĝia influo etendiĝis preter la uzantojn mem. Kvankam la rivaleco inter la grandaj naciaj lingvoj ankoraŭ regas en multaj internaciaj rilatoj, Esperanto abunde montris, ke ĝi kapablas plene ludi la rolon de efika internacia komunikilo. Restas tamen la demando, ĉu tiu lingvo plene elprovita fariĝos akceptita de la grandaj internaciaj organizaĵoj kaj de la diverslandaj edukistoj. Restas la demando, ĉu oni utiligos ĝin kiel lingvon de la nova komunika teknologio, aŭ ĉu oni preferas solvi la internacian lingvo-problemon per diskriminaciaj solvoj. Grandparte la respondo restas en la manoj de la Esperantistoj mem. La mondo ne venos al Esperanto kvazaŭ nature. Se tiel estus, ĝi venus al paco kvazaŭ nature, ĝi venus al malarmado kvazaŭ nature, kaj ĝi estingus homan kruelecon kaj homan mizeron kvazaŭ nature. Male, ĝi venos al Esperanto ĉar la parolantoj de tiu lingvo konscie kaj harmonie kaj sagace laboros por tiu celo, forigante la nescion kaj farante konvinkitojn el skeptikuloj. Oni ofte aŭdas, ke ekzistas antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto, sed vere la ĉefa malhelpo estas nescio, kaj prudentaj duboj estas forigeblaj per gravaj argumentoj.

Ĉu, do, la nuna jardeko estos la jardeko de Esperanto, la jardeko en kiu oni fine konsciiĝos pri la maljusteco kaj la <sup>ne</sup> necesaj kostoj de la nuna internacia lingva reĝimo? Lingvoj ne kreskas kiel arbaraj fungoj; ili bezonas jardekojn, eĉ jarcentojn por maturiĝi. La Internacia Lingvo jam kreskis kaj maturiĝis: ĝi staras nun preta por tiuj, kiuj pretas utiligi ĝin.

En Decembro de 1979 kompletigis 25 jaroj da rekono de Esperanto flanke de Unesko. La fama rezolucio subtena al Esperanto estis akceptita de la Ĝenerala Konferenco en 1954a. Tiu jaro koincidas kun nova erao en la rilatoj kun Unesko kaj UN, inaŭgurita de la vizito de la Ĝenerala Direktoro de Unesko al nia kongreso en 1977 kaj nun de la malfermiĝo en New York de nova oficejo de UEA, kies specifa celo estas fortigi la rilatojn kun UN. Lastan jaron UEA estis elektita al gvida rolo en la konstanta komitato de neregistraj organizaĵoj ĉe Unesko. Novaj moviĝoj de intereso pri Esperanto animas kontinentojn antaŭe apenaŭ tuŝitajn de la Inter-



LA SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

P.O. Box 1227, Cape Town.

PREZIDENTO: s-ro E. de Kock.

VIC-PREZIDENTO: s-ro A. von Blottnitz.

SEKRETARIO: s-ro O. Sher.

KASISTO: s-ro C.S. Beckford.

KOMITATANOJ: s-rino A. Fouché, s-roj H.W. Appel,  
J. van D. Strydom, F.M. Woolf.

ENHAVO

|                                  |    |
|----------------------------------|----|
| La Jardeko de Esperanto          | 1  |
| Estraro                          | 2  |
| El Parolado de d-ro Tonkin       | 3  |
| Ĉu Tutafrika Periodaĵo?          | 4  |
| Rakontetoj                       | 5  |
| La Mara Ekologio                 | 6  |
| S-ro O. Sher; s-ro J. Strydom    | 7  |
| Trilingva Artikolo               | 8  |
| Biografio de S.A. Esp.o-Movado   | 9  |
| Kaj de nia Sekretario            | 10 |
| Modernigo de la Esp.a Ortografio | 11 |
| Kaj Daŭrigo                      | 12 |
| Eĉ Tio Okazis                    | 13 |
| Verteraĵoj                       | 14 |
| Enigma Solvo. Deziras Korespondi | 15 |
| El Nia Gramatiko                 | 16 |

---

(Redaktoro: F.M. Woolf, Box 18, SEA POINT. 8060. Tel:  
44.2657; helpe de C.S. Beckford; tel: 22.6326).

---



nacia Lingvo. Staras preta la lingvo. Malfermiĝas al ni iom post iom la internaciaj organizaĵoj, la publika opinio. Pretas nia UEA Je tiu ĉi favora epoko, je la sojlo de nova jardeko, ni redediĉu nin al la laboro por la Internacia Lingvo per novaj fortoj. La jaro 1980, kaj la tuta jardeko, kiun ĝi inaŭguras, alportu pli pacan, justan kaj harmonian mondon, kie la spirito de egaleco kaj kompreniĝo animas ankaŭ la lingvan kampon por la Internacia Lingvo Esperanto.

(El novjarmesaĝo de d-ro H. Tonkin, UEA Prezidanto).

+++++++

Por Zamenhof estis la kreado de lingvo internacia ne nur celo por si mem, sed rimedo por forigi unu de la plej gravaj obstakloj, kiuj disigas la homojn. Esperanto estis por li ne nur teknika ilo por solvi la problemon de internacia interkomunikado, sed antaŭ ĉio racia rimedo, kreado de tuthomara spirita ponto, unua paŝo por rekta reciproka alproksimiĝo de homoj de diversaj nacioj. Nun kiam estis forigitaj la geografiaj baroj inter la homaj gentoj, aperas Esperanto kiel angulŝtono por la konstruo de la homara interkompreno kaj reciproka harmonia kunlaboro.

Kaj plue diras d-ro Tonkin: Ni estas malmultaj, kaj la tasko estas granda, sed ni laboras por lingvo kaj idealo tiel gravaj kaj tiel signifaj, ke ni nek rajtas, nek povas laciĝi aŭ deflankiĝi. Kiel lernintoj de Esperanto, kiel eltrovintoj de tiu miraklo de la homa komunikado, ni tiris sur nin, vole-nevole, la moralan devon antaŭ la mondo ĝin disvastigi kaj sukcesigi.

Estu multaj la homoj pretaj kunlabori, ne ĉar ili sentas sin honorataj de la flatado de la publiko sed ĉar ili komprenas, ke la animo de la Internacia Lingvo estas pli granda ol ilia animo, kaj ke laboro por la tuta homaro estas pli bona kaj riĉiga ol laboro por la propra persono.

+++ +++++

+++++++

Ĉiu, kiu legis la antaŭparolon de la Fundamento de Esperanto scias tre bone, ke ĝi ne sole ne prezentas ian baron kontraŭ la evolucio de la lingvo, sed kontraŭe, ĝi donas al la evolucio tian grandegan liberecon, kiun neniu alia lingvo iam posedis eĉ parte. Ĝi donas la eblon iom post iom eĉ ŝanĝi la tutan lingvon ĝis plena rekonebleco! La sola celo, kiun la Fundamento havas estas nur: gardi la lingvon kontraŭ ANARĤIO, kontraŭ reformoj ARBITRAJ kaj PERSONAJ, kontraŭ danĝera ROMPADO, kontraŭ forĵetado de malnovaj formoj, antaŭ ol la novaj estos sufiĉe ELPROVITAJ kaj tute definitive kaj sendispute AKCEPTITAJ.

(D-ro Zamenhof, el Cirkulera Letero al ĉiuj Esperantistoj en la 18an de Januaro, 1908).

En scienca revuo pri la prahistorio eldonita en Italujo, mi legis pritrakton de la problemo de revu-eldonado en tiu fako. La redaktoro plendis, ke en la lastaj jaroj okazis inflacio de periodaĵoj sur la nomita tereno. Li klarigis, ke eĉ en la plej bonaj kazoj nur po 300-400 ekzemp. de ĉiuj tiuj periodaĵoj vendiĝis. Oni presigas eble 1000-2000 kaj la nevenditaj restas en la mansardo. Tiuj revuoj ne povas ĝisvivi sen subvencioj kaj ili ne povas honeste pravigi la ekziston. Malgraŭ tio, ili ricevas grandajn sumojn de diversaj fontoj por elspezoj. Tiu redaktoro opinias, ke kiam revuo ekzistas 10 jarojn kaj ne atingas 1000 legantojn, tio signifas, ke la publiko ne akceptis ĝin, kiel ajn meritplena ĝi estu.

Por eliri el tiu malkuraĝiga situacio, li proponas kunfandon de pluraj eldonaĵoj, tiel ke pli da ekzempleroj povas esti presitaj je pli malalta kosto. Oni organizas la samajn informojn en malpli da revuoj. Kooperativo povas eldoni ses aŭ dudek numerojn en unu jaro. Ĉiu povas havisian apartan aspekton, eĉ kun malsama titolo kaj diversaj redaktoroj, sed kun komuna abono por ĉiuj. Malpli elspezante, ĉiuj ricevos la informojn kiuj estos akireblaj pli vastskale.

Venis en mian kapon la konstato, ke simila situacio ekzistas tie kaj tie en Esperantujo. Fakte, oni diras, ke troviĝas superflujaj revuoj, gazetoj, bultenoj, k.s., en nia lingvo, kaj ke kion ni bezonas estas ne pli da periodaĵoj sed pli bonaj periodaĵoj. Mi deziras pritrakti la eblecon kunfandi ekzistantajn periodaĵojn kaj fondi unu novan, kun servos nur la kontinenton Afrika.

El plej aŭtentikaj ciferoj mi kompilis statistikon pri nia movado en Afriko. Tri landoj havas organizitan landan movadon, kaj unu el ili junularan organizaĵon. Cetere, membroj de UEA troviĝas en 8 aliaj landoj, sen movado landa, do entute 11 landoj kun UEA membroj. La tuta Afriko havas nur 16 delegitojn. El pluraj fidindaj ciferoj mi kalkulas, ke la nombro de Esperantistoj en Afriko estas ĉirkaŭ 150, kiu estas sufiĉe realisma. Laŭ la Jarlibro, nur du periodaĵoj aperas: Bona Espero en Sudafriko kaj Malagasa Esperantisto en Madagaskaro. En 1978 estis anoncita n-ro 0 de Inter-Afriko, 8-paĝa kultura kaj informa periodaĵo. Estas evidente, ke la plej granda, landa organizaĵo (tiu de Sudafriko kun 73 membroj) ne povas subteni ampleksan revuon, kaj eĉ 150 abonantoj apenaŭ sufiĉas. Ekzistas do la ebleco eldoni periodaĵon por ĉiuj Esperantistoj en Afriko. Se la nova bulteno sukcesos, oni povos plievoluigi



ĝin, aldonante diversspecajn rubrikojn de beletra kaj 5  
kultura karaktero, por ke la revuo povu vekti intereson ĉe la  
internacia legantaro, kun la rezulto, ke la abonantaro plimul-  
tiĝos. Tiu ĉi sistemo de tutkontinenta kunlaborado eble sol-  
vus ankaŭ financajn problemojn. Kiel eldonlokon, oni povus  
elekti landon aŭ urbon, kie la revuo estus kompostita kaj pre-  
sita je la plej malalta kosto. Ekspedo de la periodaĵo nepre  
estus peraere.

Eble tiu ĉi pritrakto stimulos iom da pensado kaj diskutado;  
povas esti, ke la unua numero de La Afrika Stelo aperos okaze  
de la centjara jubileo de Esperanto en 1987a.

- Bernard Golden.

+++++

(S-ro Golden kompreneble ne scias, ke ĉiu membro de SEA sen-  
page ricevas Bonan Esperon, kiu inkluziviĝas en la jarabono.  
Nia kontribuanto estas bonkonata, tre aktiva verkisto Hungara  
kaj sperta propagandisto por nia afero ĝenerale).

(Ni invitas komentojn koncerne tiun ĉi tre interesan artikolon,  
kiu eble povus helpi solvi tre aktualan problemon en diversaj  
mondpartoj. Pro spacomanko, ni domaĝe devis iomete pritondi  
ĝin, kaj ni pardonpetas al la verkisto, samtempe kredante, ke  
ni neniel forprenis ion valoran el la enhavoj. - Redakcio).

+++++

El vestaĵbutiko en Mafeking, Kablando, daŭre, regule kaj mis-  
tere malaperis varoj dum du jaroj kaj malgraŭ multa esploro  
oni ne povis solvi la enigmon. Tiam, unu Dimanĉon la estro,  
s-ro Lottering, ree faris kontadon de ĉiuj enbutikaj komerc-  
aĵoj, kaj rimarkis fiordon venantan de la regiono de la kam-  
eno. Ekzameninte la kamentubon per elektra lampo li ekvidis  
mortintan homon interne. Jen solviĝis la mistera dujara ŝte-  
lado. La ŝtelisto en- kaj eliris pere de la kamentubo, sed  
fine fiksiĝis en la mallarĝa spaco, kaj tie mortis. Oni devis  
malkonstrui la kamentubon por eligi la kadavron. Oni poste  
konstatis, ke la nomo de la mortinto estas James Bonda, 15jara.

En la distrikto Citrusdal, Kablando, troviĝis katino kiu sam-  
tempe mamnutris siajn proprajn idojn kune kun tri hundidoj  
kies patrino mortis jenaskiĝe. Pro tio, ke la hundidoj estis  
de la raso Chihuahua kaj sekve tre valoraj, la helpema katino  
faris grandan servon al la posedanto de la hundidoj.

(Ambaŭ el "Die Burger", ensenditaj de s-ro E.S.V.)



En Genevo en Palaco de Unuiĝintaj Nacioj estis starigita ekologia plano por savi la vivon en la maroj kaj en la akvobasenoj, antaŭiĉio en Mediteraneo, la plej difektita maro. Ne temas nur pri plano, sed ankaŭ pri alarma krio, ankoraŭfoje lanĉita de la tutmondaj sciencistoj kun la espero eviti la katastrofon. Laŭ la spertuloj ne ekzistas jam mara guto kiu, analizite, ne montrus spurojn de veneniĝo. Kulpas pri tio la homaj senrespondeco kaj avido, kiuj naskis atomajn eksperimentojn sur atoloj, malŝarĝadon de naftaj rubaĵoj en altan maron, la forĵeton de rubaĵoj kaj ĉiuspecaj venenoj laŭlonge de la bordoj.

Italio aparte sentas tiun negativan sperton pro netaŭga prizorgado de la kondiĉoj de sinbanado, pro siaj ĉiam pli multnombraj kazoj de forĵetado de lavpulvoroj kaj rubaĵoj, pro nesufiĉo de taŭgaj filtroaparatoj. Sed la aliaj landoj ne troviĝas en pli bonaj cirkonstancoj. Ekzemple, la golfo de Guanabara, ĉe kies bordoj situas Rio de Janeiro, kiu estas unu el la plej belaj en la mondo, havas krizan nivelon de veneniĝo.

Eraras tiuj, kiuj diras, ke maro estas tiel vasta, ke la homa agado ne povas endanĝerigi ĝin. Laŭ la spertuloj, kuniĝintaj en Genevo, kontraŭe, la maro estas mozaiko de diversaj medioj, kaj ĉiu el la eroj facile povas difektiĝi kun nerebonigeblaj, ĉenreakciaj procesoj.

En la Palaco de Unuiĝintaj Nacioj oni projektis dokumentajn filmojn kun eksterordinara scienca valoro. En la mara mondo ekzemple vivas 2500 specioj de madreporoj. Sur la tuta tero madreporoj naskis atolojn kaj insulojn kiuj, apudmetite, formus surfacon 700-oblan kompare kun Italio. Malgranda akvoveneniĝo sufiĉas por ke madreporoj (animalaj nur kelkajn centimetrojn longaj) mortu; kaj ili mortas ankaŭ, ĉar iu molusko, kiu vigle defendas madreporojn, ĉiam pli ofte estas enskatoligata por produkti saŭcojn. La sciencistoj diras, ke la dissolviĝo de la madrepora mondo kaŭzus tutmondajn katastrofojn. Pro tio la ekologia plano alvokas al la homa konscienco, por ke oni rigore reguligu la fiŝkaptadon kaj oni ĉesigu la masakron de tutaj bestspecioj, por ne aliigi senpripense la mirindan, naturan ekvilibron.

- La Migranto.

Se ekzistas amo pura kaj neniel miksitita kun niaj aliaj pasioj, ĝi estas tiu, kiu estas kaŝita en la fundo de koro, kaj kiun ni mem ne konas.

- La Rochefoucauld.



Oni eble pensas pri Universala Kongreso, pri agado ĉe la registaraj instancoj, pri regule ĉeestataj klasoj, ktp. Mi ne neas, ke ili kompreneble gravas. Sed ekzistas ankaŭ multaj, aliaj vojoj, per kiuj ni povas sekvi niajn proprajn ideojn por ion fari pri nia afero.

Se, kiel komitatano aŭ simpla, ordinara membro de Sudafrika Esperanto-Asocio, vi havas taskon farendan, plenumu ĝin senprokraste; estas egale ĉu vi devas pagi kotizon, verki artikolon por Bona Espero, plusendi gazeton aŭ agnoski ricevon de letero. Tasko, kiu postulus duonhoron por plenumi, daŭrus la saman duonhoron se vi farus ĝin nun, post semajno aŭ post monato. Sed se vi farus ĝin nur post monato, ĉagrenus vin via konscienco, se tiun vi havas, kaj se ne, tiun de aliaj membroj kiuj opinias, ke decas, ke vi havu. Morgaŭ estas la amata tago de mallaboruloj.

Se la sekretario daŭre devas memori membrojn pri farendaj taskoj aŭ esplori kial ili ne respondas al aliaj membroj, tio forprenas lin de pli utilaj taskoj. Same kiel vi, li disponas nur limigitan tempon por elfari Esperantajn taskojn.

- O. Sher.

=====

### LIBRORECENZO.

Libro: Praktika Bildvortaro de Esperanto.

Kompilis: Language Services.

Eldonas: Oxford University Press.

Ĉi tiu libro estas Esperantlingva versio de anglalingva bildvortaro. Ĝi estas bone kolorpresita, tre utila kaj posedinda nova aperaĵo.

La bildoj konserviĝis ekzakte kiel en la originala verko. Pro tio la kompilistoj avertas, ke oni tie kaj tie rimarkos, ke tre konata vorto en Esperanto mankas sur specifa paĝo, dum aliloke estis necese nomi ion por kio Esperanto ĝis nun ne evoluigis netan terminon. Oni do devis uzi kelkajn "neologismojn", sed la fonto de ĉiu neologismo estas dece indikata. Do, espereble tradiciemuloj ne tro forte estos ĝenataj.

La vortaro estas mendebla ĉe Language Services, 17, High St., St. Peter's, Broadstairs, Kent, U.K. Se vi deziras aĉeti ĝin bonvolu sciigi la sekretarion de SEA. Ĝi kostos proksimume tri randojn.

- J. Strydom.



The town of Mafeking in the Northern Cape, historically famous for its dogged siege during the South African war and the founding of the Scout Movement (Lord Baden-Powell was in charge of the British forces in the town), is to become part of the Republic of Bophuthatswana. The State President, Mr. Marais Viljoen, made the announcement in Cape Town at a banquet in honour of the visit to South Africa of President Lucas Mangope of Bophuthatswana. He said the South African Government intended establishing a committee of experts to work closely with the Bophuthatswana Government so that the transfer would be orderly. The Whites of Mafeking, who have felt uncertain what their future might be when Bophuthatswana became an independent state, now feel it has been secured and are making plans.

La urbeto Mafeking en Norda Kablando, historie famkonata pro sia obstina sieĝo dumtempe de la Sudafrika milito, kaj pro la fondo de la Skolt-Movado (Lordo Baden-Powell komandis la Britajn militistarojn en la urbeto) iĝos parto de la Respubliko de Bophuthatswana.

La Ŝtat-Prezidanto, S-ro Marais Viljoen, tiel anoncis en Kaburbo ĉe festeno honore de la vizito al Sudafriko de Prezidanto Lucas Mangope de Bophuthatswana. Li diris, ke la Sudafrika Registaro intencis establi komitaton de spertuloj kiuj intime laboros kun la Bophuthatswana Registaro, por ke la transdono bonorde okazu. La Blankuloj de Mafeking, kiuj sentis sin malcertaj pri la estonteco kiam Bophuthatswana fariĝis sendependa ŝtato, nun opinias ĝin sekura kaj ili do faras siajn planojn.

Die dorp Mafeking in Noord-Kaapland, wat in die geskiedenis bekend is vir sy hardnekkige beleg tydens die Tweede Vryheidsoorlog, en die stigting van die Verkenningsbeweging (Lord Baden-Powell was in beheer van die Britse magte in die dorp), gaan deel van die Republiek van Bophuthatswana word.

Die Staatspresident, mnr. Marais Viljoen, het die aankondiging in Kaapstad gedoen tydens 'n banket ter ere van pres. Lucas Mangope van Bophuthatswana se besoek aan Suidafrika. Hy het gesê die Suid-Afrikaanse regering is van plan om 'n komitee van kenners te stig om nou met die regering van Bophuthatswana saam te werk sodat die oordrag ordelik sal verloop. Die Blankes van Mafeking, wat onseker oor hul toekomstige gevoel het toe Bophuthatswana onafhanklik geword het, voel nou seker en maak planne.



Cu vi konas la afrikansan ŝlosilon presitan en 1934a? Kia-maniere aktivis nialandaj Esperantistoj ĝis tiu dato? Nia gazeto Bona Espero komenciĝis en 1963a, sed kion oni verkis kaj eldonigis dum la intertempo? Ni ĵus ricevis dikan faskon da Esperanto-presaĵoj pri kies ekzisto nia estraro tute ne sciis. Parto konsistas el ekzempleroj de "Libera Tribuno", "published and produced by the Workers Esperanto Fellowship, P.O. Box 7356, Johannesburg", ĉirkaŭ 1946a.

Tion konstatinte, ni petas la plej malnovajn Esperantistojn inter ni, skribi biografion, tiom, kiom ili scias, pri la sudafrika Esp.o-Movado, ĉar evidente la granda plimulto pri nia historio jam forgesiĝis, do ni devas konservi tion, kion ni ankoraŭ havas. Ankaŭ en Bona Espero de Februaro de 1970 la ĉefartikolo atentigis pri la neceso de tia kroniko kaj donis referencojn al ESPERANTO EN PERSPEKTIVO (1974), al ENCIKLOPEDIA DE ESPERANTO (1933/34) kaj al la gazeto AFRIKA ESPERANTISTO de 1955/57.

Ĉi-sube ni almetas parton de artikolo aperigita de la Work. Esp.o Fellowship en 1946a: (Kontribuis: A. von Blottnitz).

Ĉar eksterlandano ne komprenus kio signifas "ero de Afrikano" se oni alprenus la vort-formon "Afrikanero" por difini la Afrikansan vorton "Afrikaner", estas sugestite de la Gripo laŭ E.S.V., ke la Esperanto-ekvivalento estu Afrikansulo, sed tio tute ne taŭgos, ĉar -ul estus tiuokaze aĉe misuzata, estante sufikso nur por derivi nomojn de personoj aŭ estaĵoj kiuj estas karakterizataj per la eco esprimata en la radiko. Do, almenaŭ eksterlandaj Esperantistoj, kiuj trafus la vort-formon AFRIKANSULO, ne sciante ĝian difinon, sekcius ĝin laŭe: Afrik(o)-ans(o)-ul(o) kun la senco de "persono, kiu estas RIMARKINDA pro la eco de anso"; aŭ alterne: Afrik(o)-an(o)-sul(o), sence ia Afrika birdo!

AFRIKANSO estas lingvo, do estus, miaopinie, malprave diri, ke iu persono, estante Afrikansa-parolanta, havas en si la econ de tiu lingvo. Li nur povoscias ĝin, kaj lia natura akirado de ĝi ĉe la genoj de sia patrino ne faras lin rimarkinda pro ĝia posedo, nek faros lin, laŭ mia juĝo, fundamente, aŭ ia anso, aŭ ia birdo! Nia grupa ĥoro sugestas plue, ke Angla-parolanta Sudafrikano estu nomata Anglulo, el kiu oni komprenus, laŭ sekcio 37a de la Ekzercaro, ke jen temas pri unu persono, kiu posedas la econ de Anglo aŭ de la Angla lingvo je RIMARKINDA grado! Ĉu eblas esti pli arbitre ol tio? Kaj per Aziulo devas esti komprenata ekz. Hindu naskita en Sudafriko. - S.A. Andrew.



Oscar Solly Sher, B. Com.(UCT), C.A. (SA), naskiĝis la 13an de Oktobro, 1939 en Moorreesburg, 130 kilometrojn distance de Kaburbo. Edziĝinte fine de 1967, li havas 10jaran filon. Li abiturientis de la Kaburba Altlernejo kaj komencis lernoservi ĉe kontrolistoj. Li trapasis la enirekzamenon de la Sudafrikaj Kontrolistoj en 1962 kaj fine de 1966 ricevis B.Com. Diplomon de la Kaburba Universitato. En 1967 li translokiĝis de Kaburbo, la leĝdona ĉefurbo al Pretoria, la administra ĉefurbo. Ekde 1970 li laboras kiel kontrolisto ĉe South African Iron & Steel Corporation (Isacor). Krom Esperanto, lia flankokupo estas la stenografio.

S-ro Sher eksciis pri Esperanto el ĉefartikolo en pri-stenografio ĵurnalo. Li sekvis la korespondkurson pere de s-ro F. Woolf kaj en 1977 trapasis la mezgradan ekzamenon. Li regule ĉeestas la monatkunvenojn de la Johannesburga Esp.o - Societo. Kiam en Marto, 1977a, la sidejo de SEA translokiĝis al Pretoria, li fariĝis kaj ankoraŭ estas la Sekretario.

+++++++

Du el niaj membroj ĉeestos la venontan Universalan Kongreson en Stokholmo, S-rino M. Dickson el Kaburbo kaj s-ro Z. Stifter el Pretoria. Ni deziras al ili agrablan vojaĝon, memorindan viziton ĉe la UK kaj sekuran revenon.

Gratulojn al s-ro E. de Kock pri la apero de lia artikolo en la novaperinta ĵurnalo "Monato". Ĝi serioze resumas la politikan situacion en Sudafriko kiel nun troviĝantan.

Ankaŭ s-ro Sher, nia sekretario, partoprenas la gratulojn nune disdonatajn, pro lia gajno de la unua premio en la "Portret-enigma" aperinta ĝuste en la sama "Monato". Esperable tiuj ĉi du membroj niaj elmontras la vojon por aliaj...

+++++++

Iu nigrulo troviĝis antaŭ la magistrato de Wynberg (Kablando) pro tio, ke li estis ŝtelonta du librojn en butikoj. Li deklaris, ke li intencis ŝteli ilin ĉar li multe ŝatas legi. La magistrato tamen iomete dubis kaj ordonis al li laŭtlegi el libro. Sed li ne povis, kaj sekve ricevis la kutiman punon por butikŝtelado.

Ĉe Queenstown troviĝas hundo de la raso KEES kiu tie famiĝis pro lia facileco amikiĝi kun pavianoj. Ordinare tiuj bestoj sin reciproke ege malamas. Ofte la hundo forlasas sian hejmon kaj vizitas pavianojn sur apuda monto, kaj ofte kelkaj el ili vizitas lin ĉe lia hejmo. El Die Burger.



En certaj Esperanto-gazetoj aperis kritikaj artikoloj koncerne la diversajn proponojn modernigi la ortografion de Esperanto. Por povi pritrakti tiun gravan aferon serioze estas necese paroli pri faktoj.

1. Estas fakto ke, el teknologia vidpunkto, la ses specialaj literoj, ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ kaj ŭ estas maloportunaj, ĉar ili ofte malhelpas ĝustamane tajpi Esp.o-tekstojn. Nur la skribmaŝinoj por la lingvoj franca, hispana, itala, nederlanda, portugala, rumana kaj turka ĝenerale posedas la cirkumfleksan supersignon. Male, tri kvaronoj de ĉiuj latin-literaj skribmaŝinoj nuntempaj ne posedas cirkumfleksan aŭ signon por la ŭ. Oni do rajtas demandi ĉu, en la nuna epoko artefarita lingvo ne ĝustamane tajpebla per 75% el la milionoj da ekzistantaj latinliteraj skribmaŝinoj povas ludi la rolon de universala lingvo internacia. Evidente, la respondo ne povas esti jesa.
2. Estas fakto, ke la planoj de la klavaroj de la skribmaŝinoj iĝis starigitaj per oficialaj kaj tutmonde validaj normoj. Pro industriaj kaj komercaj imperativoj, oni ne povas senpere aldoni al la multaj diversaj kategorioj de nunaj skribmaŝinoj kvar pliajn signojn aŭ enmeti tiujn ĉi en la lokoj de signoj nun troviĝantaj sur klavaroj kaj bezonataj de la ĝenerala uzantaro. Oni do devus krei novajn seriojn de maŝinoj por ĉiuj landoj kaj fari multekostajn investojn. Konante tiujn faktojn, oni komprenas, ke la problemo ne estas facile solvebla, kiel iuj opinias.
3. Estas fakto, ke la situacio estas same malfavora ankaŭ en la pres-industrio. Oni ne povas facile presigi Esperanto-tekstojn en iuj ajn latinliteraj presejoj, kaj tial oni ankaŭ ne povas facile aperigi Esp-o artikolojn en iuj ajn nacia-lingvaj ĵurnaloj, gazetoj, ktp. Sekve, la publiko ĝenerale scias nenion pri Esperanto aŭ supozas ke ĝi malaperis.
4. Estas fakto, ke en la nun rapidege evoluanta komputor-scienca, la supersignoj ne estas tajpeblaj. Tiu industrio diras: Kial vi ne adoptas la sensupersignan anglan alfabeton? Vi devus reformi la ortografion de via lingvo, anstataŭ postuli, ke ni modifu la jam sufiĉe komplikajn kaj multekostajn komputorojn.
5. Estas fakto, ke d-ro Zamenhof plurfoje esprimis sian bedaŭron pro la ekzisto de la ses specialaj literoj, kaj en 1887a proponis la jenan, helpan regulon: "Se en presejoj mankas la 6 literoj, oni povas anstataŭe uzi ch, gh, hh, jh, sh kaj u". Por ekzemplo, la diversaj skribformoj proponataj por la vorto 'kondiĉo' (kondicho, kondicco, konditco, kondiŝho, kondidzo) estas ĉiuj maltaŭgaj; male, perfekte taŭga estas la formo kondicio - laŭ propono de d-ro Zamenhof.
6. Estas fakto, ke en 1894 d-ro Zamenhof publikigis proponon pri vasta gramatika reformo en la lingvo, kies alfabeto ne plu

enhavus supersignojn. Sed ĉar la reformpropono - tro radikala pro la multaj gramatikaj ŝanĝoj - estis malakceptita de 157 personoj kontraŭ 97, la taŭga reformo de la ortografio ne realiĝis. Tamen la principo estis ĝusta.

7. Estas fakto, ke en la Esp-o alfabeto mankas la literoj q, w, x, kaj y, sed kiuj ekzistas pli/malpli en preskaŭ ĉiuj latinliteraj lingvoj. Ili estas ĉiuj necesaj kiel simboloj kaj por terminoj en la diversaj sciencoj.

8. En 1978 aperis detala leksikologia studo kun serioze ellaboritaj proponoj kiamaniere modernigi la Esperanto-ortografion surbaze de la angla alfabeto, kiu ja ne enhavas supersignojn kaj kiuj ekzistas senescepte sur la klavaroj de ĉiuj latinliteraj skribmaŝinoj, komputoroj, ktp., ktp., kaj elektronikaj tradukiloj.

Ĉar nenio alia estas ŝanĝita en la gramatika strukturo de la lingvo, iuj tekstoj en la nova ortografio estas same facile kompreneblaj kiel tiuj en la Fundamento. Sekve, iu risko pri skismo (kiel tiu pro Ido) fakte ne estas timenda.

9. Estas tre probable, ke la plej influaj ŝtatoj en la latinlitera lingvo-hemisfero rifuzos agnoski Esperanton tiom longe, kiom ties neperfekta ortografio ne estos perfektigita. Tial, anticipaj klopodoj ĉe parlamentanoj estas ne nur vanaj, sed eĉ danĝeraj, ĉar ili povus grave kompromiti la finan sukceson deziratan de ni ĉiuj.

(Iomete mallongigita).

Yves Guéguénat,

Profesoro pri la latina, greka, franca kaj Esperanto.

Legantoj, kiuj deziras esti plene informitaj pri tiu ĉi grava afero, bonvolu legi la broŝuron "Optimala Ortografio de la Internacia Lingvo Esperanto", mendebla ĉe la eldonejo O.E.O., 24 ave. de Riedisheim, F-68100, MULHOUSE, Francujo.

+++++

Opinioj, kritikoj, ĝeneralaj sugestoj pri tiu ĉi grava diskutemo estas petataj al ĉiuj niaj legantoj. La Redakcio atendas komentojn, kiom eble plej multajn, ĉar ŝajnas, ke la afero vere tuŝas la pluvivon de nia lingvo. La fakto, ke Z. mem volus siatempe fari ŝanĝojn ĉi-supre indikitajn parolas por si mem. La artikolo eble montras unu el la ĉefaj kaŭzoj pro kiuj Esperanto ĝis nun ne faris la al ĝi ŝuldatan progreson.

+++++



Flikistino: Akuzita de prirabo de ies libereco, komerca vojaĝisto Arno Hall devis aperi antaŭ juĝejo en Kopenhago. La fraŭlo estis enŝlosinta najbarinon en sia loĝejo. Tie ŝi devis fliki por li amason da ŝtrumpoj.

Nekrologo: Vane la vidvino de Reginald Camberwell protestis kontraŭ lia testamente postulita nekrologo. Nun definitive sur lia tomboŝtono legeblas: "Fine mi scias pli multe ol mia edzino, kiu ĉiam asertis scii ĉion".

La Venĝo de Figaro: Frizisto el Milano devis aperi antaŭ juĝejo ĉar li estis tondinta klienton duonkalva. "Estis mia venĝo" deklaris tiu Figaro, "la akuzanto dum dancvespero de nia gildo dancis la duonan vesperon kun mia fianĉino".

Telegramo al Sankta Petro: En la regiono de Wilton, Usono, post longa sekeco krevis la nuboj, pluvegis tri tagnoktojn. Tiam en la loka gazeto oni legis helpvokon: "Ĉiuj, kiuj preĝpetis pluvon - bonvolu tuj ĉesi"!

Bestkalumnio: En Piraeus, Grekujo, viro rompŝtele enpaŝis vilaon, kvankam je la ĝardeno pordo estis legebla admono: "Atenton, mordema hundo"! La ŝtelisto senĝene forprenis kelkajn valoraĵojn. Forlasante la vilaon li apud la admono algluis paperon kun la vortoj: "Ne kalumniu la hundon"!

Sana: Ĉe la universitato Youngstown, Ohio, Usono, ekzistas esplorcentro pri parola agresemo. Ĝia unua eltrovaĵo: Blasfemado kaj malbenaĵo estas sanaj por korpo kaj spirito. Homo, kiu konstante forglutas sian ĉagrenon, laŭ opinio de esplorestro, povas malsaniĝi aŭ eĉ morti pro tio.

Tro frua Ĝojo: Enloĝanto de Morelia, Meksikio ĝojis, kiam la polico telefone informis lin, ke ili retrovis lian ŝtelitan aŭtomobilon. Kiam la posedanto atingis la indikitan lokon, li tamen travivis malagrablan surprizon: la veturilo jam estis denove ŝtelita.

Publicista Laboro: Gazeta eldonisto en San Francisco devis esti punita pro ŝofora ebrieco. La juĝisto kondamnis lin dum unu jaro verki tri komentariojn pri la danĝeroj de alkoholo kaj publiki ilin en sia gazeto.

Malavantaĝo de Beleco: Juĝisto en Londono sekvas sian propran principon. Se temas pri kompensaj pagoj al vidvinoj li destinas pli grandajn sumojn por malpli belaj inter la virinoj kaj malpli grandajn sumojn por la pli belaj. Motivo? Belulinoj ne tiel urĝe bezonas la monon. Ili ja havas pli bonan ŝancon reedziniĝi.

Dancpremio: Diskoteko en Istanbul donis tre aktualajn premiojn al la unuaj du venkintoj en danckonkurso: po 10 litroj da multekosta benzino. Por la dancisto en la tria loko devis sufiĉi botelo da ĉampano.

Sur la terpeco antaŭ la domo de Isaac Reed en Benoni, Transvalo, troviĝas granda kaj ege stranga rano. Kiam homoj alproksimiĝas, ĝi atake antaŭeniĝas al ili. Se iu tenas branceton antaŭ la rano ĝi ekmordas ĝin en du pecojn.

- El 'Transvaler'.

Ie en Jugoslavio miloj da fiŝoj senkonscie troviĝis sur la akvo-supraĵo de rivero, kaj oni opiniis, ke iu fabrikejo enlasis venenajn forĵetaĵojn en la akvon. Sed subite la fiŝoj unupost la alia rekonsciiĝis, kaj fornaĝis. Spertuloj poste konstatis, ke alkoholo de iu fabrikejo iukaŭze enfluis la riveron, ebbriigante la fiŝojn, kiuj post iom da tempo ree sobriĝis.

- El 'Beeld'.

Okazis ĉe Saldanha, Kablando. Ie, proksime al elektra fosto kuŝis pinto de forrompiĝinta drato elektra, kaj en akvoflako apude staris hundo. Ordinare nenio estus okazinta, sed malbonŝance la hundo ekdecidis levi sian malantaŭan kruron en la direkton de la fosto. Pro tio ekestis portempa "fluid-drato" inter la flako kaj la fosto laŭ kiu eksaltis forta elektra fluo, kiu tuj mortigis la hundon. La okazaĵo senigis grandan parton de la urbeto de elektro-povo.

- El 'Die Burger'.

Estis bela, suna, somera tago kaj la loko estis en Norfolk, Anglujo. Veturigisto de ŝarĝaŭto demetis siajn vestaĵojn kaj tutnude kuradis inter la arbojn. Kiam poste li serĉis siajn vestaĵojn li ne povis trovi la lokon ... Fine, li troviĝis ĉe la polico kiu tre amike ne agis kontraŭ li, sed konsilis, ke li estontece kunportu kompason!

- El 'Cape Times'.

Usona ino kun la nomo Louise Zimmerman petis, kaj akiris permeson oficiale ŝanĝi sian familinomon al Zimmerwoman. Laŭ ŝi, Zimmerman devenas de la tempo de vira subpremado de la inoj.

- El 'Der Deutsch Afrikaner'.

La urbestroj de Siena kaj Florence malpermesas aŭtomobiltrafikon en la historiaj mezurbaj partoj.

- El 'Die Burger'.

Ĉe Nairobi en Kenio magistrato sendis homon kiu prirabis butikiston malliberejen por 34 jaroj kaj aldone ordonis, ke li ricevu 60 vergobatojn. Helpinto, kiu ne antaŭe krimis, ricevis 20 jarojn kaj 50 vergobatojn. Pro multa krimo la estraroj estis devigitaj apliki ege severajn punojn.

- El 'Cape Times'.



Jen la solvo de la enigmo prezentita en la Januara B.E:  
Konsideru, ke la sferoj estas numeritaj, 1 - 12.

Kazo A: Pesu 1 ĝis 4 kontraŭ 5 ĝis 8. Se ili egalas, la malsama objekto troviĝas inter 9 ĝis 12.

Pesu 1,2,3 kontraŭ 9,10,11. Se la maldekstra pleto leviĝas, vi scias, ke 9,10 aŭ 11 estas la malsamaĵo kaj ĝi pezas pli ol la aliaj. Pesu 9 kontraŭ 10.

Se ili egalas, la 11a estas la nekonforma sfero ĉar ĝi estas pli peza ol la aliaj.

KAZO B: Se la maldekstra pleto malleviĝas, vi scias, ke 1,2,3 aŭ 4 estas pli peza, aŭ ke 5,6,7 aŭ 8 estas pli malpeza. Certe vi scias, ke 9,10,11 kaj 12 estas sampezaj. Pesu nun 1,2,5 kaj 6 kontraŭ 3,9,10 kaj 11. Leviĝo de la maldekstra pleto signifas, ke aŭ 5 aŭ 6 eble estas malpeza, aŭ ke 3 estas pli peza.

Pesu 5 kontraŭ 6. Se ili egalas, la peza 3 estas la nekonforma sfero. Sed se 5 estas pli peza ol 6, tiu ĉi estas la sfero kiun vi serĉas.

La tuto estas tre facila procedo. Ĉu vi konsentas?!

#++++++

DEZIRAS KORESPONDI

Ekkel Aleksandr, Vlatskaja-21, 310013 - Harkov, USSR.

Marzena Zienda, 19-500 GODAP, U. Zeromskiego 48, Poland, kun 17-19 jaraĝaj.

Vladimir Hampl, u. Rybricka 1517, 56002 Ĉeska Třebova, CSR.  
(Czechoslovakio).

Pekim Tenorio Vaz, Caixa Postal 82, 50,000-Recife-PE, BRAZIL.  
23jara junulo, dez. kores. kun similaĝa Esp.ino de S.A. Li studas ankaŭ la anglan.

Josef Zákoutský, Havlíčkova 430, NOVA PAKA 50901 Czechoslovakio. 22jara ĝardenisto. Naturo, muziko. Satas biĉkli, p.m.ojn, librojn. Tre deziras korespondi. Atendas baldaŭan respondon.

Ladislav Šera, Komenského 44, 042 22, KOSICE, SPŠE-p-s-42, CSSR (Czechoslovakio). Filatelisto.

Al eksterlandaj korespondantoj: Bonvole skribu vian nomon kaj adreson preslitere, petante plumamikojn, ĉar estas tute neeble deĉifri skribaĵojn sur la plimulto de la leteroj ricevitaj, ĉar por tio tre mankas la tempo. Dankon. (Red.)



Pri "varti" kaj "flegi": La vortojn VARTI kaj FLEGI mi komprenas en la sekvanta senco: varti = zorgi pri iu en la senco de servado (por mono); ekz., mi estas malsana kaj ne havas familion aŭ amikon, tial mi pagas al fremda persono, por ke li vartu min en mia malsano; flegi = zorgi pri iu el amo, aŭ en maniero pli morala; ekz., infanistino vartas infanon, patrino flegas lin. Mia edzino ĉiam min flegas, sed kiam mi estas malsana, tiam oni prenas por mi vartanton.

Pri la uzo de la akuzativo en dubaj okazoj: Tuŝante la akuzativon mi povas al vi doni la jenan konsilon: uzu ĝin ĉiam nur en tiuj okazoj, kie vi vidas, ke ĝi estas efektive necesa; en ĉiuj aliaj okazoj, kie vi ne scias, ĉu oni devas uzi la akuzativon aŭ la nominativon - uzu ĉiam la nominativon. La akuzativo estas enkondukita nur el neceso, ĉar sen ĝi la senco ofte estus ne klara; sed ĝia uzado en okazo de nebezono pli multe malbeligas la lingvon ol la neuzado en okazo de bezono.

Pri la apostrofado de la artikolo: Se vi ne scias, kiam vi devas uzi la formon la kaj l', uzu ĉiam pli bone la formon la. La formon l' mi uzas ordinare nur post prepozicioj, kiuj finiĝas per vokalo (ekz. tre, de, je, tra); en ĉiaj aliaj okazoj mi uzas ordinare la plenan formon la, ĉar alie la senco povus fariĝi ne klara, eĉ la sono ne agrabla.

Demandite, ĉu oni povas uzi "ajn" kun la serio io, iu, ie, ktp., d-ro Zamenhof respondis: "Jes, ĉar en Esperanto ĉiu vorto povas esti kombinata kun ĉiu alia".

Anstataŭ "ĉio tio ĉi" vi povas tre bone diri "ĉio ĉi", ĉar la vorto "ĉi" jam por "multaj homoj" (ĉiu aparte); "multe da homoj" = granda nombro da homoj (kune).

Estas diferenco inter "multaj homoj" (= diversaj homoj (ĉiu aparte)); "multe da homoj" = granda nombro da homoj (kune).

Pri "en": El la frazoj, pri kiuj vi demandis min, mi pensas, ke la plej bona estas: "Oni parolas en Esperanto"; tiun ĉi modelon vi povas rekomendi al ĉiuj komercistoj.

Pri forlasado de sufiksoj: Ni uzas ordinare la formon "konatiĝi" (= fariĝi konato kun iu); sed ankaŭ la formo "koniĝi" estas tute bona (fari sin koni ion).